



Norvega Esperantisto

ESP ER AN TO B LA D E T

N-ro 2
1966

ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA LIGO
ĈEFREDAKTORO: JOHAN HAMMOND ROSBACH

3-a periodo
32-a (37-a) jaro
Monata

La por-propona laboro ne jam finiĝis

LASTA, SED URĜA ALVOKO AL ĈIUJ!

Respondante al peto de UNESKO daŭrigi, ankaŭ en 1966, la agadojn planitajn por 1965 laŭ la Laborplano por la JIK, la Estraro de UEA unanime decidis daŭrigi, ankaŭ dum la unua jarduono 1966, la varbadon por la PROPONO al U.N.

Ĉiuj jam scias ke la rezultoj akiritaj, ĝis nun, estas plene kontentigaj je vidpunkto de la kolektivaj subskriboj; sed ke la nombro de la individuaj subskribo estas ankoraŭ ĉiam malpli granda ol tiu, kiun ni akiris okaze de la Peticio (1950). La diferenco ankoraŭ estas proks. 200 000!

Se ni tamen akiris pli ol 680 000 subskribojn en UNU jaro ni, per plia streĉado de niaj fortoj, CERTE kapablos atingi, se ne LA MILIONON, almenaŭ nombron pli altan ol la antaŭa, kiu estis 895 432 . . . sed akirita en pluraj jaroj.

Ni diras «CERTE», kondiĉe kompreneble ke tiuj, kiuj jam faris plene sian devon, daŭrigu ankoraŭ dum kelka tempo sian laboron. Sed PRECIPE, kondiĉe ke la centoj da esper-

antistoj, *kiuj ne jam faris ion*, inter kiuj estas eĉ kiuj ne jam MEM subskribis la Proponon, plenumu ankaŭ sian plej elementon devon!

Ne povas esti, ke UNU samideano, kiu apartenas al loka grupo, nacia societo aŭ internacia organizaĵo kiu ajn estus *ne-subskribinta mem kaj kun siaj familianoj*, la Proponon, pri kiu tiom da ESPERANTOJ fidas ke, se ĝi ne tuj helpos al fina venko, ĝi tamen vekos tiom da atento en specialaj medioj, ke ĝi alproksimigos nin al la tago de la enkonduko de la internacia lingvo en la lernejojn.

Restas al ni ĉiuj ankoraŭ iom da tempo . . . *tamen ne multe*. Semajnoj, monatoj rapide forflugas. Estas la momento por diri: *Ne prokrastu ĝis morgaŭ, kion vi povas fari hodiaŭ!* Prenu do la folion, kiun vi eble posedas kaj bedaŭrinde flankenmetis, aŭ petu tuj folion, kaj FINE FARU VIAN ESPERANTISTAN DEVON!

Al tiuj, kiuj jam larĝe faris sian devon, ni diru simple: laŭdon kaj dankon kaj . . . daŭrigu!

Ekzamena Komisiono de N.E.L.

Supera ekzameno decembro 1965

TRADUKAĴO

Den magre mannen.

Dette hendte i en av våre mindre byer. En kone gikk rundt i byen og lette etter en veldig tynn og mager mann. Hun spurte alle hun traff om de kunne hjelpe henne, men ingen hun så, var tynn nok.

Endelig kom hun ned på kaia, og der så hun en mager mann hoppe i land fra en liten båt. Hun så nøyte på ham og fant ham *passende* (1). Så hilste hun på ham og spurte om han ville tjene femti kroner.

«Ja, gjerne,» svarte han, «men hva skal jeg gjøre til gjengjeld?»

Hun svarte at han bare skulle følge med henne hjem og gjøre nøyaktig hva hun sa.

Så gikk de til hjemmet hennes. Der sa kvinnen: «Nå skal du gå inn i det rommet der og kle deg helt naken. Når du er ferdig, lukker du opp døra.»

Han gikk inn. En kunne høre hvordan det *knirket* (2) i knoklene da han tok av seg, så mager var han.

Litt senere åpnet døra seg, og der sto han — helt naken. Det var den magreste mann en kunne tenke seg.

Utenfor døra sto kona med sine to små sønner: «Der kan dere se! Slik vil dere også komme til å se ut hvis dere ikke lydig spiser *havregrøten*

(3) deres hver morgen.»

1) passende = konvena

2) knirke = knari

3) havre = aveno

KLUBA JUBILEO

Bodø Esperantoklubb estos 30-jara la 6-an de marto.

Informoj de la Ekzamena Komisiono

Ordinaraj printempaj ekzamenoj. Ekzamenoj okazos ĉirkaŭ la 1-a de Junio 1966. Instruistan ekzamenon oni povos fari en Oslo, superan kaj elementan ekzamenojn en Oslo, Bergen, Haugesund, Sarpsborg, Sauda, Stavanger, Tromsø kaj Trondhejmo. Oni anoncu sin sur la presitaj skemoj riceveblaj de la ekzamenaj komitatoj aŭ rekte de la Ekzamena Komisiono. Oni sendu la skemojn al tiu komitato, ĉe kiu oni intencas fari la ekzamenon, antaŭ la 1a de Majo. Personoj, kiuj faros la ekzamenon ne en Oslo, plenu po 2 — du — skemojn. *Plenu la skemojn precize kaj komplete!* — *Ailĝoj, kiuj alvenos post la 1-a de Majo, ne estos konsiderataj.*

Adresoj de la lokaj ekzamenaj komitatoj:

OSLO: Ekzamena Komisiono, Boks 942, Oslo. Poŝtĝirokonto 100 34.

BERGEN: S-ro Kjell Offerdal, Sv. Hjetlands vei 6 B, Bergen.

HAUGESUND: S-ro Olav Thormodsen, Boks 59, Haugesund.

SARPSBORG: S-ro Johan Hammond Rosbach, Huldervn. 17, Sarpsborg.

SAUDA: S.ino Elna Matland, Brekkeveien 50, Sauda.

STAVANGER: S-ro Trygve Kvalvåg, Seehusensgt. 52 B, Stavanger.

TROMSØ: S-ro Arne Høgseth, Sjøgate 5, Tromsø.

TRONDHEJMO: S-ro Ragnv. Rian, Boks 109, Trondhejmo.

Ekzameno plenumita. Dum Decembro 1965 superan ekzamenon sukcese plenumis en Oslo s-ro John Berggreen.

Ekzamena Komisiono de N.E.L.
C. Støp-Bowitz
prezidanto

Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

Redakcio: Johan Hammond Rosbach, Hans Amund Rosbach

Adreso de la redakcio: Hulderveien 17 B, Sarpsborg. — (Limdato por manuskriptoj: la 20. en la monato antaŭ la apero.

Abonprezo: En Norvegujo kaj eksterlando: n. kr. 8,—

Anonprezoj: 1/1 paĝo kr. 150,—

1/2 p. kr. 75,—, 1/4 p. kr. 38,—

1/8 p. kr. 19,—.

Certe

Kvankam duloke en ĉi tiu numero de Norvega Esperantisto vi povas legi pri la plilongigitaj Jaro de Internacia Kunlaboro kaj kolektado de subskriboj, ni volas ankaŭ el ĉi tiu speciala loko de la redaktoroj substreki la gravecon de tiu agado. Jen kie *nepre ĉiu esperantisto* povas ion fari por Esperanto. Oni ne bezonas plu diri, ke «mi volonte farus ion, se mi povus esti iel utila». Jen la granda ŝanco por esti utila!

Legu frontpaĝe la artikolon de UEA mem! Legu, kion oni skribas pri «certe»! Ĉio dependas nun de *ni mem*. Ni sukcesos nur kondiĉe ke ĉiu faru sian plej elementan devon.

Okcidenta Distrikto de N.E.L

aranĝos jarkunvenon Pentekoste la 28an—30an de Majo en ĉarma loko Hogganvik en Rogaland, kie ni plurfoje antaŭe ĝuis agrablajn tagojn en bona amiko rondo.

Ni alvenos posttagmeze aŭ vespere la 28an de Majo, kaj adiaŭas unu la aliajn la 30an de Majo posttagmeze.

La pensiona prezo estos nur kr. 28,- + 10 % tagnokte. Ĉiuj gesamideanoj,

Sciigoj de N.E.L.

La subskribkampanjo daŭros! U.E.A. informas ke ĉar UNESKO decidis plilongigi la Jaron de Internacia Kunlaborado ĝis la mezo de 1966, ni daŭrigu ankaŭ la kolektadon de subskriboj ĝis la 31a de Julio. Kvankam kelkaj el niaj membroj faris bonegan laboron pri la kolektado de subskriboj, la rezulto por Norvegujo kiel lando ne estas impona, kaj ni tial petas ĉiujn membrojn nun dum ankoraŭ kelkaj monatoj streĉi siajn fortojn por plibonigi la staton.

La norveglingva eldono de «Vivo Zamenhof». Interkonsente kun la eldonejo Dreyer N.E.L. transprenis la reststokon de tiu grava, valora kaj interesa libro tre malmultekoste, tiel ke ni nun povas vendi ĝin por po kr. 3,-. Ni petas ĉiujn esperantistojn amase aĉeti de ni la libron, kiu estos tre taŭga donaco por viaj konatoj kaj amikoj. La kluboj povus kolekti mendojn de la membroj kaj sendi kune por ŝpari afrankon.

Taskotabelo por la kluboj. — Marto. Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato. La kasisto sendas poŝtan enkasigilon al la membroj, kiuj ankoraŭ ne pagis la kotizon.

La Liga Estraro.

ankaŭ ekster nia distrikto, estu kore bonvenaj. Bonvolu anoncu vin antaŭ la 14an de Majo al

Kristian Sivertsen
sekretario
Solheimsgt. 60, Bergen

DOMENIQUE

Rek.
Domenique — nique — nique
la maljuna vagabond'
li vagis tra la mond.
Sed li fine trovis hejmon
ĉe la urbo Bet-leĥem,
ĉe la urbo Bet-leĥem.

Li admiris grandajn urbojn,
bela estis la natur',
la beleco de la mondo
estas granda aventur'.

Multajn tagojn li vagadis,
blua estis la ĉiel'
kaj dormadis li dum nokto
sola sub brilanta stel'.

Venis li al Meza-mar
petis li pri la konsol',
per boat' li velis trans' la mar'
per helpo de popol'.

Ĉiam vigla kaj amika,
lin renkontis nur ridet',
kaj ĉe Bet-leĥem vespere
staris li sur altaĵet'.

Dum ripozis li sur la altaĵ',
la urbon vidis li,
kaj ekvidis grandan stelon
kiu brilis pli kaj pli.

Jen la stelo klare brilis,
lin ordonis iri al
la infan' de virgulino
en manĝujo en la stal'.

Baldaŭ li genuis en la polvo
antaŭ l' infanet'
fororgesante la sopiron,
koron regis jam kviet.

Trad. B. Ø.



51-a Universala Kongreso de Esperanto BUDAPEST

30/7—6/8 1966

Sub la alta protektado de S.ro Ödön Kishazi
vicprez. de la Hungara Popola Respubliko

ORATORA KONKURSO

La temoj de la ĉijara Oratora Konkursuro estas jenaj:

- Estas vere malfacilege priskribi la eterne senŝanĝan homecon (Lusin);
- Arto ne konas limojn;
- Arto - ĉu memsufiĉa aŭ tendenca? ĉ. Internacieco de humuro;
- La rolo de Unesko por la reciproka kompreniĝo kaj amikeco inter la gejunuloj de ĉiuj kontinentoj.

LOĜIGA SERVO

La Loĝiga Servo ne prizorgos loĝejon por grupoj aŭ karavanoj. La partoprenantoj de karavanoj devas individue rezervi loĝejon en Budapeŝto pere de la koncerna mendilo trovebla en la ricevota Dua Bulteno.

KARAVANO

Anoncis karavanon I.E.F., ĉe s.ro G. Grattapaglia, Via Pallanza 32, Torino, Italujo.

STATISTIKO

(ĝis 10/1 1966) Arg. 2, Aŭstralio 2, Aŭstr. 16, Belg. 18, Braz. 2, Brit. 54, Bulg. 15, Ĉeĥos. 14, Danl. 20, Finn. 6, Franc. 161, G.D.R. 7, G.F.R. 69, Grek. 2, Hisp. 9, Hongkongo 1, Hung. 104, Isr. 9, Ital. 33, Jap. 11, Jug. 15, Meks. 1, Monako 3, Ned. 90, Norv. 4, Nov-Zelando 1, Poll. 17, Rum. 5, Sovet. 3, Sved. 46, Svis. 15, U.A.R. 1, Urugv. 1, Usono 17. — Entute 774 el 34 landoj. (Pasintjare 1069 el 42 landoj).

Mortis Ida

Ida Christensen estis ŝia kompleta nomo, sed ŝi mem preferis kaj petis nur «Ida». Ĉiuj, kiuj iam estis en la danaj feriaj kursoj en Helsingør aŭ Vejle, konas ŝin. Ŝi gvidis plej ofte la konversacian kurson, kiun partoprenis eksterordinare multaj personoj, ĉar ŝi sciis, en tre agrabla maniero paroligi ĉiun, kaj ĉiuj ŝatis ŝin.

Konata ŝi estas ankaŭ pro sia libro «La Forto de l' Vero» (de Adi, inversita Ida), kiu aperis en tri eldonoj. Okazas tre malofte, ke Esp-libro havas tri eldonojn! Pro sia facileco la libro ĝenerale estas tre ŝatata.

Antaŭ 30 jaroj ŝi esperantistiĝis. Tiam ŝi estis jam 50-jara. Baldaŭ ŝi fariĝis redaktoro de la dana Esperanto-gazeto kaj post tio administrantino de la libro-servo de CDEL. Dum kelkaj jaroj ŝi estis ankaŭ prezidantino de KEK (E-klubo de Kopenhago) kaj sciis aranĝi interesajn programojn.

Sed plej memorigaj estas ŝiaj kursoj en Helsingør (kaj poste ankaŭ Vejle), kie ŝi post la morto de Margr. Saxl transprenis en 1940 ŝian kurson. Verve kaj interese ŝi prelegis pri literaturaj temoj kaj gvidis viglajn diskutojn.

Ŝi estis kaj restis fidela kunlaborantino de niaj feriaj kursoj. La lastan prelegeton (pri literaturo) ŝi faris en Helsingør pasintjare, sed kelkajn mo-

KOTIZALPAGO

Laŭ la Kongresa Regularo aliĝoj al U.K. estas akceptataj ĝis la 30-a de junio 1966. Personoj, kiuj deziras aliĝi post tiu dato, devas alpagi al la fiksita kotizo la sumon de 25,- ned. gld. aŭ egalvaloro, por kompensi la ekstrajn kostojn, kiujn prokrastita aliĝo kaŭzas.

G. G. Pompilio
Konstanta Kongresa Sekretario

natojn poste ŝi ne plu havis fortojn por iri al la aŭtuna aranĝo en Vejle. Malforta kaj malsana ŝi estis la 5-an de novembro, kiam ŝi festis sian 80-jaran naskiĝotagon, sed ŝi estis feliĉa pro la amaso da gratulesprimoj el multaj landoj kaj pro tio, ke ŝiaj gemikoj Esperantistaj venis por honori ŝin.

En tiu tago ni parolis ankaŭ pri la estonta aŭtun-feria loko, la altlernejo JUNAJ HEJMOJ en Arhus, anstataŭ Vejle, kaj ŝi antaŭĝojis iri tien 16.—23. okt. 1966 kaj ĝui preskaŭ luksajn cirkonstancojn; ŝi ŝatis kaj alte taksis, ke niaj kursaranĝoj havu belan kadron. La efektivigo de tiu deziro ne okazis, ĉar ŝia koro ĉesis bati la 29an de januaro.

Mi scias, ke ŝi plu vivas en la koro de miloj da Esperantistoj en ĉiuj partoj de la mondo.

Ni honoru la memoron pri Ida.

L. Friis.

Korespondu!

Brazilano, 40-jara, dez. interŝanĝi poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj. Interŝanĝe, li sendos brazilajn poŝtmarkojn. Adreso: S-ro Jacques Auguste Courbet, Praia do Flamengo, 254 — Apto. 404 - Flamengo ZC-01, Rio de Janeiro, GB - Brazilo, Sudameriko.

47-jara laboristo deziras korespondi kun norvegino pri literaturo, arto, naturo, religio, Esperantomovado. — S-ro Arne Bengtsson, Abybergsgatan 32, Mølndal, Svedujo.

Mi tre deziras kor. kaj interŝanĝi kolorajn bildkartojn, fotografaĵojn, poŝtmarkojn. — S-ro Kairis Bronius, Kretinga, Vitauto, 4, Litova S.S.R., U.S.S.R.

Mi serĉas 18—20-jaran korespondanton aŭ korespondantinon. — S-ro Daniel Albert, La Perche, St. Jean de Bciseau, Loire Atlantique, Francujo.

RECENZOJ

Esperanta Bildvortaro

Esperanta Bildvortaro. Eldonejo: Esperanto-Press, Cardiff, Ontario, Kanado. Presprovaĵoj aboneblaj.

En iu esperanta gazeto mi foje legis demandon: ĉu iu vere povas paroli esperanton same bone kiel gepatran lingvon. La aŭtoro iom rikanis tiujn, kiuj tion asertas, kaj demandis per simplaj ekzemploj: Kiel vi nomas ti-
on ĉi?

Kaj akompana folio al tiuj presprovaĵaj folioj de la Esperanta Bildvortaro montras bildon de skribmaŝino kun montriloj al la diversaj klavoj kaj partoj, kaj demandas: Ĉu vi povus nomi la diversajn partojn? Mia respondo estas: Ne, eĉ ne en la norvega.

Sed nun la Bildvortaro celas helpi vin, kaj la aŭtoro proponas «ĝis 150 ekzemplerojn senkoste al tradukintoj, verkintoj de vortaroj, redaktoroj kaj akademianoj... kaj ĝis 350 ekzempl. aboneblaj de aliaj interesituloj. La abonprezo de la tuta verko estas 50 steloj. Abonintoj ricevos kuponon, kiu ebligas al ili aĉeti la reviziitan kaj binditan Bildvortaron rekte de la eldonisto kun 50%-a rabato.»

R.

Ĉarma fabelo

Ĝauŝutun kaj Nannona», 44-paĝa kajero, ilustrita. Ĉina Esperanto-Ligo, Pekino 1964.

Per belaj, koloraj bildoj kun mallonga teksto al ĉiu bildo, oni rakontas popolan eposon en Junnan-provinco. Temas pri reĝido, al kiu aljuĝiĝas ĉiuj beloj kaj povoj, kiu ekamas belulinon, kiu povas sin transvesti al pavo. La parencoj ambaŭflanke kontraŭas la edziĝon, kaj nur post longa lukto venas la feliĉa finiĝo.

La fabelo rememorigas pri popol-fabeloj el aliaj landoj, kaj estas simpla, bona legaĵo al infanoj, kiuj certe — pro la belaj bildoj — admiros la libron. Kaj ĝi — unikaĵo inter ĉinaj eldonaĵoj — estas sen iu ajn politika tendenco. Mi tutkore rekomendas ĝin.

Haro

Miniatūra vortareto

Svend Dragsted: Miniatūra vortareto dana Esperanto. Libroservo de Centra Dana Esperantista Ligo, Ellemarksvej 12, Århus C, 1964. Prezo: 1 d.kr.

Tre modesta, en formato de la famaj ŝlosiloj, prezentiĝas ĉi tiu vortareto, kiu certe povas helpi multajn novajn esperantistojn. La listo enhavas 1688 tradukojn de danaj vortoj, kaj estas bazita sur statistiko de Leo Blaas pri 50 000 Esperantaj tekstvortoj. Oni ankaŭ trovas tradukojn de modernaj vortoj, kiel ekz. kølleskab k. fjernsyn.

JHR.

La dua A. P.-Librolisto

kun priskribo de titoloj 1964 por ĉiuj esperantistoj, kursanoj, grupoj, bibliotekoj. Eld.: N.V. De Arbeiderspers. La vere tre bona kajero estas senpage havebla ĉe A. P.-Bockenbedrijf, Hekelveld 15, Amsterdam C, Nederlando.

Esperanto-rondeto Strojären Piespk

poŝto

PODBREZOVA, Ĉeĥoslovakio,

aranĝos letervesperon dum Pasko 1966. Bonvolu sendi bildkartojn, leterojn, esperantaĵojn.

Korespondpetoj bonvenaj, skribu amase! Ĉiu sendinto ricevos rekompencan!

Norvega Kroniko

Red.: Karsten Langsholt

JARKUNVENOJ

La Urso, Sarpsborg,

jarkunvenis 3/2. El la tagordo ni mencias: Duonhora elementa instruado. La prezidanto memorigis pri la morto de Ida Christensen. Ŝi estis tre konata, ne nur en Danlando, sed ankaŭ inter la plimulto de la esp-istoj pro sia verkado, kaj ŝia pedagogia talento estis agnoskata.

Pro la prezaltiĝo estis necese altigi la kotizon kun abono ĝis 20 kr. norv.

Estis preparolata la vizito de la japana samideano Hidejuki Sakaeda kiu montris lumbildojn kaj paroladis en «Sarpsborg Folkeakademi». Li bone sukcesis. Per magnetofono ni povis aŭskulti la intervjuon kiun la radio faris kun John Berggreen.

Elektoj: Prez.: J. H. Rosbach, vicprez.: Stig-Otto Forsberg, kasisto: S. Birch-Olsen, sekr.: Ture Resberg, estraranoj: Terje Myhre, Erik Fjeld, anstataŭantoj: Nils Chr. Stenseth, Svein Erik Barbo, revizoroj: Ragnar Kjøngnisen, K. Langsholt, gazetarakaj radiorepresentanto: Tor Walberg, studgvidanto: J. H. Rosbach, propagandisto: R. Kjøngnisen, komisiito: Sv. E. Barbo, raportanto al Norvega Esp.-isto: K. Langsholt, bibliotekisto: T. Resberg.

La Esperantoklubo de Bergen

jarkunvenis 13/1 sub gvido de Kr. Sivertsen.

La sekr. legis la jarraporton, kaj kaŭze de forvojaĝo de la kasistino, Leonora Sivertsen legis la jarbilancon. Post kelkaj rimarkoj ambaŭ estis aprofitaj.

Jen la rezultoj de la elektoj:

Prez.: Kjell Offerdal, vicprez.: Elsa

Njøten, kasisto: Nelly Bjørge Nilsen, sekr.: Kristian Sivertsen, estrarano: Ashild Birkenes, anstataŭantoj: Doris Birkelund kaj Leonora Sivertsen.

Bona atmosfero regis dum la kunveno.

ORDINARAJ KUNVENOJ

Klubo Esperantista en Oslo

kunvenis 17/1 66. La ĉefa programero estis: «Bjarne Sorknes rakontas kaj montras kolorlumbildojn pri Kanariaj Insuloj kaj Afriko.» Bjarne Sorknes estis tie en novembro kaj la multaj treege belaj kolorlumbildoj de Gran Canaria, Tenerife kaj okcidenta Afriko montris ke tie li povis ĝui sunon kaj varmon kiam ni en Oslo suferis pri neĝo kaj malvarmo. La prelego rikoltis fortan aplaŭdon.

Kirsten Ek prizorgis la 10-minutan lingvan instruadon. La temo estis la traduko de la norvega vorto «til», kaj ŝi donis ekzemplojn pri la esperantaj varieblecoj de tiu malgranda vorto.

Agot Sletterød transdonis salutojn de gesinjoroj Stuttard. Ili fartas bone.

Sauda Esperantoklubb

kunvenis 10/12. La prez. laŭlegis la decembran cirkuleron de N.E.L. Pritraktinte la enhavon de la cirkulero la sekretario laŭlegis kopion de la gratulletero kiun N. Birkeli, en la nomo de la klubo, sendis al la Unuigitaj Nacioj pro ĝia 20-jara datreveno. Al la pola radio, ni en la nomo de la klubo, skribis dankleteron pro ĝia radioelsendoj esperantaj.

O. Andersen montris belajn kolorbildojn kun samtempa akompananta muziko de sonbendo. — J. Matland faris prelegon pri Unesco rilate ĝian 19-jaran ekziston.

Proksimume dum unu semajno nia klubo faris esp. libroekspozicion en la fenestroj de Sauda Bokhandel por iom propagandi por nia movado.

FESTKUNVENOJ

Klubo Esperantista en Oslo

22/1 nia klubo aranĝis novjarfestenon. La 21 partoprenantoj altablĝis kaj ĝuis la tre bongustajn manĝaĵojn. La kluba prezidanto John Berggreen, la prez. de NEL, C. Støp-Bowitz kaj Rolf Bugge-Paulsen faris mallongajn paroladojn, kaj Kirsten Ek dankis pro la manĝaĵo. Tostestro estis Brynhild Østmo, kaj kun akompano per piano de Asbjørn Syslak ni kantis diversajn kantojn. Precipe la lasta kanto «Movigado post la manĝado» estis tre amuza. — Post la kafotrinkado en la salonoj ni dancis kaj ludis. La Teatra Grupo kaj aliaj gviditaj de B. Østmo prezentis 3 amuzajn skeĉojn kaj rikoltis fortan aplaudon.

La festeno daŭris preskaŭ ĝis la dua horo, kaj mi havis la impreson ke ĉiuj partoprenantoj pasigis tre agrablan vesperon en amika kaj gaja etoso.

La Norda Stelo, Hamar,

aranĝis Zamenhofan feston 15/12. Ĉe la bele ornamita tablo la prez.ino, sino Koller, deziris al la ĉeestantoj kaj speciale al la gastoj de la esp.-klubo en Løten koran bonvenon.

Lektoro Ruud paroladis pri Zamenhof, pri la ideo kaj pri ties laboro por Esperanto. Sekvis komuna kantado de la Himno. Inĝeniero Kleven honoris la memoron de Zamenhof per voĉlegado de lia parolado dum la unua mondkongreso. S.ro Haakenstad montris serion da belegaj kolorlumbildoj: «Unu jaro en Hedmark». S.ro Birkelid ludis gitaron kaj ege ĉarme kantis Esperantajn kaj alilingvajn kantojn.

Om «**VEIEN FRA KAOS
TIL KOSMOS**» innleder

GUNNAR RUGLAND

mandag den 21. mars 1966 kl. 19.45

i Oslo Håndverk- og Industriforenings lokale, Oslo,

og

onsdag den 23. mars 1966 kl. 19.45

i Stavanger Håndverks- og Industriforenings lokale, Stavanger

Etter diskusjon og eventuelle spørsmål blir det ev. forbundsdannelse (avdeling av Universelt Forbund for Verdensfred ved Universell Kjerlighet).

Korespondu!

44-jara oficisto tre dez. korespondi. S.ro Jan Kulík, *Pelhrimov* 489, Ĉeĥ.

*Norsk Esperanto-Forbund
(Norvega Esperantista Ligo)*

Postadresse : Boks 942, Oslo. Postgiro 100.30

Kontoradresse : St. Olavsgate 27 III, Oslo

Telefon : 20 20 83

Kontortid : Tirsdag og fredag 15.30—16.30

Turisma Servo: Boks 942, Oslo.

Postgiro 100.32

*Esperantoforlaget A/S
(Eldonejo Esperanto A/S)*

Postadresse : Boks 942, Oslo. Postgiro 100.31

Kontoradresse : St. Olavsgate 27 III, Oslo

Telefon : 20 20 83

Ĉefdelegito de U.E.A. :

S-ro Alfred Skyberg, Østensjøvn. 118 a,

Oslo-Bryn. Postgiro 133.29

La redakcio :

Privata adreso de la ĉefredaktoro :

Johan Hammond Rosbach,

Hulderveien 17 B, Sarpsborg. — Uzu tiun

adreson, kiam temas pri urĝaj sendaĵoj.

Telefona : 547 27